

Enhavo

N^o	Titolo	Aŭtoro	Paĝo
1	Enkonduko	La redaktintoj	4
A	Pavimoj internaciaj	Pierre Grollemund (Francio)	5
B	Pavimoj por blinduloj	Jaroslav Matuška (Ĉeĥio)	15
C	La portugala ŝoseo	Pierre Grollemund (Francio)	22
Ĉ	Sofio pavumita		28
D	Nova sarkofago sur Ĉernobil	Pierre Grollemund (Francio)	29
E	Baza koncepto de trafi- ko en urboj	Zlatko Hinšt (Kroatio)	37
F	La kastelo Guedelon	Pierre Grollemund (Francio)	49
G	La streko Jupiter	Pierre Grollemund (Francio)	60
Ĝ	Ornamaĵoj sur tegmen- toj	Pierre Grollemund (Francio)	67
H	Utilaj informoj	André Grossmann (FR)	73

ENKONDUKO

Kara leganto, la temoj pri konstruado estas tiom variaj, ke ni ofte bedaŭras, ke ni ne povas ĝis nun aperigi nian revuon pli ofte. Pasintan jaron, en 2018, ni povis aperigi la 60 paĝojn kun koloraj bildoj. La ĉefa temo tiam estis precipe konstruado el brikoj, kun okulfrapaj ekzemploj en Hispanio kaj okcidentaj afrikaj landoj. Tiu numero estas plu disponebla, sed restas malmultaj ekzempleroj.

Ĉi-jare, ni decidis aperigi 3 sinsekvajn artikolojn pri la temo de **pavimoj**. Fakte tiu materialo estas vere internacia kaj muntita, kun raciaj metodoj, kvankam laŭ diversaj aranĝoj. La leganto vidos, kiel en Ĉeĥio disvolviĝas rimedoj por gvidi blindulojn sur trotuaroj kaj por transiri stratojn.

Ni plu klopodas legigi en Esperanto aktualajn temojn prikonstruajn. Ekzemple, la nova **sarkofago**, kiu kovras la malnovan detruitan atom-centralon de **Ĉernobil**. Aŭ la daŭre konstruata mezepoka kastelo de **Guédelon** [gedlon] en centro de Francio, en kiu kunlaboras de pluraj jaroj masonistoj, ĉarpentistoj kaj similaj profesioj kun arkeologoj kaj historiistoj pri mezepoko.

Kelkaj paĝoj estas dediĉitaj al ĉarpentista defio: nome sukcese tajli kaj kunmeti la faman ligno-kunligon **streko Jupiter**, kiu utilas por horizontalaj traboj.

La temoj de **urbanismo** kaj **arkitekturo** restas plu ligitaj al tiuj de konstruado-mem. Tial, la leganto bonvolos legi atente kaj sen hasto la paĝojn pri **Koncepto de trafiko en urboj**.